

La pioniraj jarcentoj de la planlingva esplorado.
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1985 aprilo 04 kaj 06.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-141/Radiokasedo-141-2-886-1985-aprilo-Claude-kaj-Andree-GACOND-La-pioniraj-jarcentoj-de-la-planlingva-esplorado.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

En nia prelegserio dediĉita al la temo ‘Ekal la centjara jubileo de Esperanto!’ ni turnos hodiaŭ niajn rigardojn al la pioniraj jarcentoj de la planlingvistika esplorado.

A.- Dum la renesanco la kultura elito forlasis la praktikon de la mezepoka latina lingvo, por reveni al tiu de la klasika latino. Tiu sinteno kondukis al neantaŭviditaj konsekvencoj. Mortis la mezepoka latino kaj tute ne renaskiĝis la antikva. Kulturnivele Eŭropo perdis sian lingvan unuecon. Naciaj aŭ regionaj lingvoj konkeris la statuson de kulturlingvoj. La eŭropanoj tiam ekalfrontis la lingvan situacion, kiu nuntempe karakterizas la tutan mondon: la babelismon aŭ interkarambolon de regionaj lingvoj, inter kiuj la plej potencaj pretendos je la rolo de komuna kulturlingvo.

Cl.- Ekde la renesanca tempo babelismo priokupas pensulojn kaj esplorantojn. Oni proponis al ĝi solvojn, kiuj kondukas al tri specoj da lingvoj;

A.- Unue: al lingvoj filozofiaj.

Cl.- Due; al pasigrafioj.

A.- Trie al planlingvistiko.

Cl.- Koncerne la lingvojn filozofiajn ni menciuj ke en tiuj lingvaj sistemoj ĉiu litero aŭ cifero havas tre precizan signifon. La dekuma klasifiko de niaj bibliotekoj, la poŝtkodoj kaj kelkaj komputilaj kodoj estas la heredantoj de tiuj filozofiaj esploroj.

A.- Koncerne la pasigrafiojn oni memoriĝu ke en tiuj lingvaj sistemoj oni esprimiĝas per desegnoj aŭ simboloj. Hodiaŭ la strata signaro, la simboloj uzataj en matematiko kaj tekniko, kelkaj lingvokodoj por surd-mutuloj estas la heredantoj de tiuj pasigrafiaj esploroj.

Cl.- Pri planlingvistiko ni diru, ke esperanto kaj la granda plimulto de la lingvo-projektoj, kiujn oni kontraŭproponis al ĝi, estas la heredantoj de tiuj esploroj.

A.- Scienculoj kiel Komenski aŭ Komenius (1592-1670), Descartes aŭ Kartezio (1596-1650) kaj Leibniz (1646-1715), same kiel aro da pensuloj kaj esplorantoj malpli famaj, dediĉis jarojn de nelacigebla laboro al la serĉado de ideala lingvo, kiu kapablu malaperigi la babelismon.

Cl.- Tiuj esplorantoj havis tre precizan antaŭkonon pri la celitaĵo. Kiel ekzemplon ni citu, kion Kartezio skribis la 20-an de novembro 1629 al patro Mersenne:

A.- "...planante lingvon, en kiu estas nur unu maniero konjugacii, deklinacii kaj konstrui la vortojn, el kiuj neniuj estu nekompleta kaj nek malregula (kio rezultas de la korupto pro la uzo), kaj eĉ ke la flekcio de la substantivoj kaj de la verboj kaj la konstruo (de la vortoj) fariĝu per afiksoj aŭ antaŭ aŭ post la primitivaj vortoj, ĉiuj afiksoj estante difinitaj en la vortaro, tiam ne estos mirindaĵo, ke komunaj spiritoj...

Cl.- ni dirus hodiaŭ "simplaj homoj"

A.- ...ke komunaj spiritoj lernos en malpli ol ses horoj verki en tiu lingvo helpe de la vortaro..."

Cl.- Jen tre ekzakta priskribo de tio, kio estos ekzemple esperanto post 250 jaroj. Sed ĝis la naskiĝo de la Lingvo Internacia de Doktoro Esperanto du jarcentoj de provoj, de sinsekvaj eksperimentoj, de lingvaj malkovroj estos necesaj.

A.- La esploroj de Kartezio kaj de liaj posteuloj eknaskis la sciencon Interlingvistiko, kiu estas ligita al la lingvistiko kaj al la sociologio. Ĝi okupiĝas pri planlingvistiko, pri komparo inter la lingvo-projektoj proponitaj de plej diverstendencaj esplorantoj. Ĝi serĉas klarigojn al iliaj sukcesoj pli malpli efemeraj kaj al iliaj malsukcesoj. Esperanto fakte pli kaj pli fariĝis la ĉefa esplortemo de interlingvistiko.

Cl.- La venontan semajnon ni prezentos al vi la unuajn lingvo-projektojn paroleblajn, kiel [Solresol](#) de [Jean François Sudre](#), El [Universal Glot](#) de [Jean Pirro](#), kaj [Volapük](#) de [Johann Martin Schleyer](#). Ĉiu el ili estis siamaniere geniaj eltrovaĵoj, kiuj inspiris la posteulojn.

A.- Ĉisemajne ni refoje citu tekston de Kartezio, alian eron el la letero al Mersenne. Ni konstatos, ke ĝi orientigas la serĉadon en la direkton de filozofia lingvo:

Cl.- "...Cetere, skribis Kartezio, mi opinias, ke oni povus aldoni al tio...

A.- tio estas la jam priskribita lingvo lernebla en ses horoj

Cl.- ...ke oni povus aldoni al tio inventon, same por krei la primitivajn vortojn de tiu lingvo, kiel por iliaj karakteroj, tiamaniere, ke ĝi povus esti instruata en sufiĉe malmulte da tempo pere de ordo, tio signifas kreante ordon inter ĉiuj pensoj, kiuj povas formiĝi en la homa spirito, sammaniere kiel ĝi nature ekzistas inter la nombroj; kaj same kiel oni povas lerni dum unu tago nomi ĉiujn nombrojn ĝis senfino, kaj skribi ilin..."

A.- same oni povus lerni ĉiujn nomojn de tiu filozofia lingvo. Al tiu serĉado Leibniz dediĉis multajn jarojn da laboro. Li deziris malkovri lingvon, kiu ne nur estus la adekvata esprimo de la penso, sed ankaŭ "instrumento al racio". Por Leibniz la vortoj devus ne nur traduki la difinon de la ideoj. Ili devus ankaŭ igi videblaj iliajn konektojn, kaj sekve la verojn, kiuj rilatas al tiuj ideoj. Tiel oni povus ilin dedukti per algebraj transformoj. La kalkulo anstataŭus la rezonadon.

Cl.- Por Leibniz, kiel por multaj esplorantoj de la deksepa kaj dekoka jarcentoj, la lingvo universala devus esti algebro logike aplikebla al ĉiuj ideoj kaj al ĉiuj objektoj de la penso.

A.- Ĉiuj kompleksaj ideoj estas kombinaĵoj de simplaj ideoj, same kiel ĉiuj nombroj ne bazaj estas produktoj rezultantaj de la multipliko de nombroj bazaj. La kombinado de la ideoj analogas al la aritmetika multipliko kaj la malkomponado de ideo en ties simplaj elementoj analogas al la malkomponado de nombro en ties bazaj faktoroj.

Cl.- Tiel tre resume pensis Leibniz. Louis Couturat publikigis kaj komentariis en 1903 eseojn, kiujn Leibniz verkis ĉirkaŭ 1679, kiam li havis 33 jarojn. Sed fakte ekde la 18-a jaro li meditis pri tiuj lingvaj kaj filozofiaj problemoj kaj liaj provoj influis la posteulojn. Ili lasis spuron eĉ en esperanto.

A.- Jes, la korelativoj, kiuj estas kombinaĵo de simplaj ideoj, estas inspiritaj de la filozofiaj lingvo-sistemoj: kiu, kio, kiam, kiel, ktp. Vi bone konas tiujn tre utilajn vortetojn.

Cl.- Ni dediĉos tutan elsendon al tiuj filozofiaj serĉadoj, kiuj renaskiĝis sub la formo de serĉado de lingvo, kiu konvenu por konversacii kun komputiloj.

A.- Estas nedubebla fakto, ke Zamenhof konis, se ne la Leibnizajn studojn, almenaŭ tiujn de aliaj esplorantoj, ĉar ankaŭ la harmonio de la verbaj finaĵoj respegulas filozofiajn lingvo-sistemojn: -as, -ant, -at; -is, -int, -it; -os, -ont, -ot. Tio estas tiom videbla, ke kelkaj ŝatas aldoni -unt kaj -ut paralele al -us.

01.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon Claude kaj Andrée Gacond daŭrigos tiun ĉi prelegaron, kies titolo estas "Ekal la centjara jubileo de esperanto." Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*